WIKIPEDIA

Galoa lingvo

La **galoa lingvo** (memnomo: *galo*, france: *gallo*, bretone: *gallaoueg*) estas unu el la du lingvoj de Bretonio en Francio. Kvankam ĉiuj en Bretonio parolas nun la francan, ankaŭ viglas okcidente la Bretona lingvo kaj oriente la galoa.

Male de la bretona, kiu estas keltida lingvo, galoo estas lingvo de Oïl kaj do estas tiel maljuna kiel la franca lingvo (kiu ankaŭ devenas de la lingvoj de oïl), kiu dum la lastaj jarcentoj pli kaj pli forte influis la galoan por nun anstataŭigi ĝin. Pro tio, multaj personoj, kaj eĉ lingvistoj kiel Georges Kersaudy en sia verko *Lingvoj senlime : malkovrante la lingvojn de Eŭropo*, taksas la lingvon de miksaĵo inter la bretona kaj la franca, kio estas malestimanta eraro ĉar la bretona tute apartenas al alia lingvofamilio.

Enhavo

Uzantoj

Ekzemploj

Asocioj

Eksteraj ligiloj

Vidu ankaŭ

Uzantoj

Galoo estas parolata en "Alta Bretonio", t.e. la departementoj Ille-et-Vilaine, Loire-Atlantique kaj parte en Côtes-d'Armor kaj Morbihan. Precipe parolata de maljunuloj, la galoa estas ankoraŭ iom parolata en kamparo. Verŝajne kelkaj miloj da personoj parolas kaj komprenas ĝin. Sed la lingvo estas pli kaj pli malaperanta, precipe ĉar la lingvo ne estas unuigita. Efektive, laŭ la regiono, la akcentoj kaj eĉ la vortoj varias. Asocioj nuntempe klopodas por unuecigi la vortliterumojn. Jam aperis vortaroj kaj libroj galoe. Ekzemple la bildlibro Tinĉjo (ankaŭ tradukita Esperanten) aperis en galoo.

[[Sosiero:Bilingual signage-Gallo.jpg|eta|Galoa anonco en renna metroo]]

Ekzemploj

Ekzistas multaj skribmanieroj. La vortaroj kontraŭdiras unu la aliajn. La sekvantaj ekzemploj estas tiuj de Rennes, kiel sur la bildo. Pri la prononco: *eu* estas franca "eu", *an* estas franca nazala sono kaj la *u* estas la franca "u".

Galoe	France	Esperante
anoet [ane]	aujourd'hui ("anuit")	hodiaŭ
avet [avet]	abeille	abelo
betunae [bet*u*ne]	fumer	fumi
bié neir [bje na]	blé noir	fagopiro

chaérr [ŝer]	chaise	seĝo
chapèu [ŝape]	chapeau	ĉapelo
doujaé / donjaé [duĵa]	délicat (douillet)	delikata
fórmaij [forma]	fromage	fromaĝo
desort [desor]	sortie	elirejo
cheir [ŝe]	tomber (choir)	fali
biq [bik]	chèvre (bique)	kaprino
emer [eme]	aimer	ami
ostèu [oste*u*]	maison	domo
góll [gul]	bouche (gueule)	buŝo (faŭko)
limerot [limero]	numéro	numero
lip [lip]	lèvre (lippe)	lipo
maézoe, admaézoe [meze]	désormais	ekde nun
nouna [nuna]	non	ne
o [o]	avec	kun
peirr [pir]	poire	piro
pié [pje]	pluie	pluvo
escoll [ekol]	école	lernejo
chat-de-boéz [ŝadbue](arbarkato)	écureuil	sciuro
esteill [etel]	étoile	stelo
sublae [suble]	siffler	sibli
sia [sija]	si	jes ja
seuillée d'éve [s*eu*jedev]	seau d'eau	sitelo da akvo
us [*u*]	porte (huis)	pordo
yen [j*an*]	oui	jes

Asocioj

- 1976 : Les Amis du Parler gallo
- 1978 : Maézoe
- 198? : Association des Enseignants de Gallo
- 2003 : A-demórr
- 2004 : Lez emóleriy au sórgarr

ankaŭ *Brtégne Galése* (Galoa Bretonio)...

Eksteraj ligiloj

- Asocio Maézoe (http://www.maezoe.com) (galoe, bretone, france, angle, germane, katalune, hispane, okcitane)
- Asocio Bertaèyn Galeizz (france, galoe) (http://www.bertaeyn-galeizz.com)
- Elŝutebla vortaro franca-galoa, galoa-franca (france, galoe) (http://www.freelang.com/dictionnaire/gallo.html)
- 2 aŭ 3 lingvojn en Bretonio? (france) (http://web.archive.org/20060217142619/www.geocities.com/ar_falz/Gallo.html)
- Kursoj (galoe, france) (http://ademorr.free.fr)

- Lez emóleriy au sórgarr (galoe, france) (http://www.sorgarreditions.com)

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Listo de lingvoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Galoa_lingvo&oldid=5812252"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 20:39, 12 dec. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.